Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko: EKO 2015-47 sendita el Greziljono, la 31an de oktobro.*

# La pinto de l'AMO atingita, kaj eĉ plio

La kelkaj seminariaj kuraĝuloj en Kulturcentro Greziljono sentime pretigis sin por la fina konkero de nia obstina monto granita, kiun necesas ne trabori sed grimpi. EKO 46 raportis koncize pri la konkeroj de etapoj unu kaj du -- pri la informaj laboroj, pri la starigo de kursoj.

Nun la skipo devis pluiri al la instruado kaj eble la plej malfacila ascenda defio, la rokaj bariloj kiuj malhelpas pluiron al la efika utiligo de la lingvo. Post la informado, la aligo al kurso, la lernado, kiel plekti la kursfinintojn en komunumon, kiel igi ilin konscii pri la ebloj uzi la lingvon kaj voli tion fari? Tamen, la pinton ni atingis en gloro. Ni arigis bonajn ideojn pri ĉiu etapo; tiujn ni devos alimaniere, iel, iam vidigi.



En la antaŭlasta tago seminarianoj faris pliajn analizojn, pri ĉiuj kvar etapoj unu post unu. Por ĉiu etapo ili ricevis la taskon resumi kion povos fari agantoj je diversaj niveloj: kiel unuopuloj aŭ lokaj grupoj agu, kiel Landaj Asocioj kaj Fakaj Asocioj agu (kun aparta atento al ILEI pri la edukaj aspektoj) kaj kiel agu la tutmondaj organizoj (UEA, SAT) kune kun siaj kontinentaj komisionoj. Ni venis al la konkludo, ke ne sufiĉe fortas tiaj vertikalaj ligoj kaj tio limigas nian efikecon.

En la lasta tago ni farjigis la diskutojn per FLAM-analizo pri tute loka kaj konata instanco – la kulturcentro de Greziljono mem. Do, ni analizis la Fortojn kaj Lamaĵojn de la kulturcentro, de ĝiaj gvidantoj, helpantoj kaj apogantoj. Aferojn, kiujn tiuj gvidantoj kaj aliaj povas influi. Poste ni analizis faktorojn ekster la rego de la greziljonanoj mem, sed kiuj influas favore (Avantaĝoj) aŭ malfavore (Minacoj) la pluiron. La fina parto de la sesio dediĉiĝis al la elpensado de kelkaj solvoj, por limigi la Lamaĵojn kaj la nocan influon de Minacoj, kaj samtempe pli efike eluzi la Fortojn kaj Avantaĝojn. Ĉio estis zorge protokolita por posta referenco.

Dum tiuj lastaj pezgrimpaj tagoj, ni tamen revenis al la tasko el etapo 1 rafini la ĉefajn mesaĝojn perindajn en la informa laboro. Jen la rezulto:

1. Esperanto ekzistas, funkcias, evoluas.
2. Relative facile lernebla ĝis uzeblo.
3. Justa kaj ekonomia komunika solvo.
4. Rekonata ĉe Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, ĉe KER-ekzamenoj, iuj universitatoj…
5. Proponas alternativajn specojn de kontaktoj; ponto inter kulturoj.
6. Protektilo de invadataj kaj minacataj lingvoj.
7. Aŭtentikaj kontaktoj kaj amikeco.
8. Fascina, fleksebla lingvo (aparte por emfazi inter junuloj)

La vicordo estas intenca, sed ne rigora. Oni elektu argumentojn laŭ la interesoj de la cel-grupo.

Ne hezitu en interparoloj citi personan sperton pri la supraj temoj – ofte tio pli konvinkas ol teoriaj aŭ ĝeneralaj proklamoj. En interparolaj situacioj ne nur prediku, sed interparolu por rapide aŭdi la interespunktojn de informpetanto; tio influos la uzotajn argumentojn.



Staĝantoj, helpanoj, kantantoj, AM-antoj fine de la aranĝo: Fotoj: Martine Freydier

Eblus pri la etosplena seminario kaj staĝo raporti multon pli, sed tio restu por aliaj okazoj…

Vortoj 460





Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Pli da aperintaj komunikoj: iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...